

HENRY-DAVID THOREAU



Suplemento
de
La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
108 B 1976 1 FF

Henry-David Thoreau ^(o)

Libroj... en kiuj ĉiu penso estas nekutime aŭdaca; libroj, kiuj ne taŭgus por senokupulo, per kiuj timemulo ne volus distriĝi; libroj, kiuj eĉ sukcesas igi nin danĝeraj por la sociordo : jen tio, kion mi nomas bonaj libroj. H.-D. T.

La homo, kiu sin malkovras antaŭ ni en "Walden", donas al ni pri si mem sufiĉe vivan guston, por ke al ĉi-lasta aldoniĝu la deziro pli antaŭen penetri lin. Ĉi-rilate, neniuj aliaj paĝoj povus pli bone nin edifi kaj kontentigi ol ĉi tiuj, kie disfloras la solulo, atingas sian realan staturon, kaj tiel pliigas nian kontenton lin koni ĉe lia plej alta grado de hom-eco. Ni ne donus plenan justecon al Henry Thoreau, se ni ignorus tiajn agojn, impetojn, vortojn per kiuj manifestiĝas individuo, kiun ni povus nomi la granda frato de l'ermito al kiu plaĉis konsideri sian animon en la pura spegulo de lago.

Nur nuntempe oni komencas agnoski la veran lokon de tiu potenca verkisto, originala kaj gustoplena. Iom stompita ĝis tiam en la disradiado de Emerson kaj la grupo de Concord - la vilaĝo de Novanglio kie fluis lia tuta vivo - oni pli kaj pli ekkonscias ke, en tiu konstelacio el brilaj kaj ĉarmaj spiritoj, li estas unika kaj, per ia eco hodiaŭ multe pli valora por ni ol la plej luma rideto, li ĉiujn superas, - ke li "transcendas tiujn transcendentalistojn". Reĝustigo, kiu cetere nur konfirmas la verdikton de Emerson mem, sufiĉe subtila por senti ĉe sia intima amiko tiun superecon, kaj sufiĉe sincera por ĝin konfesi al si mem.

(o) El antaŭparolo al volumo france titolita "Désobéir" (Malobei).

Kontraŭis al Henry Thoreau same la naturo iom abrupta de lia genio, kiel la tre speciala formo de lia sindono en la servo de malnova idealo, kiu de jarcento al jarcento ŝanĝiĝis laŭ la nomo, sed esence restas la afero de l'homo. Verkisto, kiu krude puŝegas ĉiujn niajn antaŭjuĝojn, kiu per trafaj sarkasmoj frakasas la fortikan socian armaturon lin ĉirkaŭantan, (sen kunpremi la nekunpremeblan !) tiu verkisto ege riskas atendi longe, antaŭ ol esti komprenita kaj amata. Krome, tiu solulo, tiu kamparano amanto de sia kamparo, tiu mistika pagano antaŭ kies okuloj la najbaraĵo de Novanglia vilaĝo proklamis la tutan riĉecon universan, tute ne similis karrieriston. Ŝajnas, ke dumvive Thoreau la termezuristo (por nomi la plej konstantan el liaj okupoj) ne multe suferis publikigi nur du librojn, dum la materialo por pli ol dek aliaj restis al li kiel manuskriptoj. Oni povas imagi, ke liaj manesoj ankaŭ ne estis submetis pro senpacienca atendante ĝis lia naskiĝa centjarfesto en 1917, por ke la mondo en siaj animoj la plej sentemaj, ŝajnu fine vekiĝi ĉe la reala seneco kaj beleco de tiu nomo.

Tiel estas, ke dum longa tempo legis tiun verkiston sole nur amikoj de la floroj kaj birdoj, naturalistoj, amantoj de l'plenaero. Ili ja pravis, sed nun ankaŭ ni pravas, al ili ne fordonante Thoreau. Ĉar li ja havas al ni ion alian por rakonti, ol aferojn ĉarmajn aŭ precizajn pri la paruo kun nigra kapo aŭ la ezokoj de sia lago. Potencoj en li superaj al ĉi-lasataj allogas nin. Tio estas la artisto, kies prozo jam havas la aspekton kaj patinon de la grandaj klasikaĵoj, la majstro de la lingvo la plej firma kaj la plej gustoplena, kiun iam oni skribis trans Atlantiko. Thoreau estis manlaboristo. Kiam ili estas dotitaj per talento, la manlaboristoj karesas la vortojn aŭ la formojn kun majstreco kaj fajneco nekompareblaj, kvazaŭ iliaj mankaloj presus sur la materio unikan stampon. Se li ne estus tiom manuzinta la hojon, mezurinta tiom da marĉoj kaj herbejoj, ne la sama lumo estus restinta ĉe liaj paragrafoj, ne la sama saporeco ĉe liaj frazturnoj. Ĉapitro de Thoreau estas io labormane konstruita.

Profundajn fibrojn emocias en ni ankaŭ la vagabondo, la sovaĝulo, la neservutigebla, eĉ ekster lia sola vivofazo, kiun oni ŝajne ĝis nun konis - la du jarojn pasigitajn en kampa ermitejo. Fine, tio estas la homo fronte al la homoj, tiu, kies "ne" tiel noble sonas - la ribelulo.

Kun ĉi-lasta aspekto precipe - ĉu ni diru la plej grava, ĉar ĝi kompletigas la individuon - li aperas en tiu ĉi volumo sen la plej eta ofero, fare de la verkisto, de siaj kvalitoj : vervo, firmeco, suverena mezuro, kaj tiu vorta denseco laŭ kiu oni taksas la artiston.

o°o

Kelkaj vortoj speciale pri la materialo de tiu ĉi volumo.

La paĝoj, el kiuj ĝi konsistas, apartenas al diversaj fazoj de ekzistado kiu estis mallonga : fakte, ili kovras kvazaŭe la tutan kreivan periodon de Thoreau - de la dudekkvina jaro ĝis la kvardek kvara kaj lasta.

"La Gasto" datiĝas de 1843, nome de liaj debutoj, dum "La vivo sen principo" kaj "Marŝi" estas postmorte aperintaj eseoj, karakterizaĵoj de lia matureco. Inter tiuj deirpunktoj kaj finpunktoj intermetiĝas "Malobei la leĝojn", kiun li aperigis en 1849 en periodaĵo, kaj la jenaj pecoj, kiujn li publike legis : "Sklaveco ĉe ni" en 1854, "Por John Brown" en 1859, "Liaj lastaj momentoj" la sekvintan jaron.

En "Walden", Thoreau elvokas sian areston - preteksto por "Malobei la leĝojn" - iun tagon kiam, irinte el sia enarbara kabano kun ŝuo riparenda, kiun li portis al la vilaga ŝuisto, li estis enkarcerigita pro rifuzo pagi la imposton. Iu kia Henry Thoreau tro sincere fidis la promesojn, kiujn lia Kreinto eksplicite enskribis en lin, por subvencii per siaj fruntoŝvite akiritaj denaroj, Ŝtaton, kiu tenadis la sklavecon kaj plufaris en Meksikio konkermiliton. Tion pli malbone, se la plej valoraj subtenis tiun ekspedicion - kiel Walt Whitman en gazeto, kies redaktoro li tiam estis. Li, Henry Thoreau, ne konsentis.

La plimulto de la aludoj pri la tiamaj altranguloj kaj eventoj restas por ni preskaŭ tiel klaraj, kiel ili estis por la samtempuloj. Apenaŭ bezonate estas, por la paĝoj formantaj la centroparton de ĉi tiu libro, rememori certajn faktojn de tiu febra kaj bela epoko, kiam en la Norda Unuiĝo apogeis la kontraŭsklaveca kampanjo. Ne nur ekonomiaj interesoj estis implikitaj en la konservado aŭ forigo de de la sklaveco, sed ankaŭ funde morala demando, kiun multaj sentis nepre solvenda, eĉ se devus pro tio la Unuiĝo rompiĝi.

La agitado favore al la negroj estis fariĝinta tre vigla precipe de post la voĉdono en 1854 de la "Leĝo por Kansaso kaj Nebrasko", kiu lasis al la kolonianoj mem la zorgon decidi, ĉu la sklaveco estos aŭ ne permesita en tiuj novaj teritorioj, dum ekde 1820 la "Kompromiso de Misurio" estis fiksinta linio, norde de kiu la sklaveco restis malpermesita. Tiu voĉdono (...) ŝajnis insulto kaj minaco al ĉiuj Aboliciistoj, kiuj post tio pliigis sian fervoron. Eĉ en la Nordaj Ŝtatoj la registaroj, sub potencaj influoj, ŝajnis en tiu debato partianiĝi al la sklavposedantoj; ekzemple Masaŝuseco, kiu estis voĉdoninta en 1850 "Leĝon pri la fuĝantaj sklavoj" - leĝon superkrimecan, kiu permesis al la tribunaloj resendi al iliaj mastroj la negrojn sekrete irintajn en liberan landon. (...) Tiaj juĝoj efikis kiel tertremo. La tuta politika vivo restis ŝanceliĝanta. (...)

En la tragedio de John Brown la emocio atingas sian plej altan gradon - antaŭ ol eksplodi iom poste ĉe la elekto de Lincoln, kaj fine en la Civila Milito, kiu konkludis la debaton. "Patro Brown", kiu pasigis malmildajn jarojn en Kansaso kun siaj filoj, batalante kontraŭ la sklavecanoj, fine por plenumo de jam longe dorlotita plano arigas dudekhoman roton kun kiu li surprize kaptas la arsenalon de Harper's Ferry en Virginio; li esperas, per tiu riskoplena fero, ribeligi ĉiujn negrojn ĉirkaŭ si, ilin estri, kaj konduki la sanktan militon ĝis falego de la "monstro". Kaptita post sovaĝa defendo, li estas juĝata en emo-

ciaj cirkonstancoj, kaj al morto kondamnita de Virginia tribunalo. En ĉiuj Nordaj Ŝtatoj lia faro estas rigardata kiel pura frenezaĵo. Tiuj estas malmultaj, kiuj kuraĝas publike defendi la maljunan Puritanon obstinan, kiu sola aŭdacis tiel agi, dum tiom da sentemaj animoj predikis la Abolicion, timante ĉian respondecon.

Henry Thoreau, kiu persone konis Patron Brown, kaj estis leginta en liaj okuloj la tutan belecon de lia pura volo, Henry Thoreau, kiu amis pli ol ĉiujn aliajn homspecimenojn, tiujn tipojn de grandega energio, estas tuŝita de tiu tragedio ĝis la kerno de l'koro. De tio li iĝas sendorma. Li, la homo supere indiferenta antaŭ la tiel nomataj grandaj eventoj, kiuj okupas la homojn, estas ŝancelita kiel li neniam estis de iu ajn ekstera fakto. Tio reale estas la plej granda skuo en lia vivo. La dimanĉon, 30an de Oktobro 1859, kvar tagojn antaŭ la verdikteldiro fare de la tribunalo de Charlestown, Thoreau kunvokas la loĝantojn de Concord al parolado. Kelkaj pro timemaĉo kontestis la oportunecon de tiu manifestado; li respondis sufiĉe krude: li ne petis ilian opinion, deklaris al ili, ke li estis parolonta POR LA KAPITANO JOHN BROWN... Kaj li efektive parolas per vortoj emociaj kaj fieraj, ne por peti indulgon al la "martiro", sed por lin defendi kontraŭ la kalumnioj, por glori lian agon kaj la agon de ĉiuj Brown estintaj kaj estontaj.

Movado favora al la kondamnito baldaŭ etendiĝas ĝis Eŭropo. Preskaŭ el la sama insulo de kie ekiris la antaŭan jarcenton la avo de Thoreau - el Guernsey, la najbara insulo - sonega voĉo kuniĝas kun tiu de la preleginto de Concord. La saman tagon, kiam la ŝnuro estis ligata ĉirkaŭ la raspa kolo de la maljuna partizano, paĉjo Hugo, ankoraŭ esperante prokraston, - en sia fido al la "civilizita mondo", kiun li vidis tra si mem - skribas de Hauteville-House: "Oni ne senpune faras tiajn aferojn fronte al la civilizita mondo. La universala konscienco estas malfermita okulo". Kaj eksciante pri la ekzekuto, li skizas unu el siaj nervozaj desegnoj, sur kiu stariĝas en la spaco

la pendumilarbo portanta sian frukton, kun ĉi tiuj vortoj sub la bildo : PRO CHRISTO SICUT CHRISTUS. "John Brown estas heroo kaj martiro", skribas li al iu amiko petinta lin publikigi la desegnon. "Lia morto estas krimo. Lia pendumilo estas kruco..." kaj, ĉar jam en tiu momento antaŭsignoj anoncis baldaŭan uraganon, Hugo aldonas : "Ni remetiu sub ĉies okuloj, kiel instruon, la pendumilon de Charlestown, deirpunkto de tiuj gravaj eventoj..."

Nune la severa grandeco de Brown, serene mortinta por iu ideo post kaj antaŭ tiom da aliaj, pli trafe tuŝas nin tra la frateca grandeco, kiun ĝi vekas ĉe homo kiel Thoreau. Ĉar neniu alia epizodo same donas al tiu mistikula vivo ties finiĝan sencon. Ni subite ĉi tie ricevas la plej evidentan ateston, kiu permesas al ni ne nur kontroli la harditecon de tiu fiera individuisto, sed ankaŭ ekscii ĝis kia grado li kapablis depostuli favore al la homo. Ĉar Patro Brown estis tia aktivulo ne fidanta, por abolicii entute maljustegan aferordon, je la paroladoj, voĉdoniloj, gazetkampanjoj kaj predikoj, kaj de tiam estis malvarmsange teksinta kaj persone kondukinta INSUREKCION, tial Thoreau, la "soleca promenantulo", tiel malŝatanta politikon, abrupte sin ĵetas helpe al la maljuna Puritano, kies sola figuro jam estis lin konkerinta. Ĉar ankaŭ Thoreau kredas pri la sankta neceseco de la insurekcio, kiam estas riskata tiel grava afero. Ja forta estis la pasio al la naturo ĉe la ermito de Walden, sed tiam li sin fordonas al ankoraŭ pli mastrema pasio.

Post la tragedio de Charlestown, kun nova ĝojo ni revenas, riĉiĝintaj de tiu eksperimento, al la ĉefa vivotemo de Thoreau : "Marŝi", marŝi en la suno kaj la vento, en la intimeco de l'arbaroj kaj de l'riverbordo, marŝi esplorante sin mem kaj la mondon. Tie ni ĉeestas lian ĉiutagan laboron; ĉar ja laŭritme de la paŝado li komponas kaj arigas la foliojn de sia vivo. En "La Gasto", ni lasas la senmiksitan liberecon, la spacotrinkanton halti momenton ĉe la gastejo de l'bona akcepto, por ke aliaj kompanoj survoje pasantaj, ankaŭ tie haltu por lin retrovi, kaj retro-

vi sin en li.

Emcioj forigintaj, homarfazoj por ĉiam formortintaj - diros oni je la elvokado de la ardaj jaroj, kiuj ĉirkaŭis la pendumon de John Brown. Jes, se la propreco de Thoreau ne estus ilin elvoki kun ilia universaleca aspekto. Juĝi ĉu tiuj paĝoj superas la okazon, kiu ilin estigis, ni hodiaŭ havas la eblecon, pli ol unu duonjarcenton post tiuj eventoj kaj tre fore de la medio, en kiu ili disvolviĝis. Tiu verkisto ilin faras eterne aktualaj.

Ankaŭ hodiaŭ pruviĝas la sentimeco de lia penso. Tiu ĉi ne nur ne malnoviĝis, sed povas esti ke ĝi eĉ alprenas por ni tonon pli riĉan, sencon pli plenan ol tiun, kiun ĝi eble havis por la malplej timemaj el liaj samtempuloj. La tempo, la spertoj ĝin kvazaŭ maturigis, rivelis la latentajn sencojn, kiujn li tie deponis. Imagi al si, tial ke ne plu estas negraj sklavoj en la Sudaj plantejoj, aŭ tial ke la Meksikia milito estas tre malnova historio, ke la denuncado de Thoreau pri la sklaveco kaj konkerdeziroj havas plu nenian sencon por la leganto de la dudeka jarcento, estas eraro. Kiam tia homo prononcas certajn vortojn, "la sklavoj", "la milito", tiuj vortoj havas amplekson, kiu ilin konvenigas al ĉiuj aĝoj. En lia penso la milionoj da negroj por kies savo mortis lia amiko, Patro Brown, estas nur unu el la aspektoj de "la sklaveco"; sub diversaj formoj, en la ĉiea senfino, li ĝin malkovras postvivonta la senjugiĝo de la negroj. La sklaveco regas, kaj eble pli danĝere, same inter la blankuloj kiel sur la kotonkampoj. Li pensas pri la tempo kiam LA NUNA SKLAVECA FORMO NE PLU EKZISTOS TIE ĈI, kaj pri LA EBLECO, EN LA FLUANTAJ JARCENTOJ, DE REVOLUCIO PROFITE AL ALIA SUBPREMITA POPOLO. Kaj kiujn li plenkore dezirus liberigi, kiujn li volus instigi al la ribelo, tiuj estas la grandega popolo el la "sklavoj nekonsciaj pri sia sorto", siaj najbaroj, siaj samuloj, la tiel nomataj liberaj homoj, la timemaj, sendecidaj, al la tradicio kaj mil antaŭjuĝoj submetitaj, tiu tuta pasto mola, kiun la ribelago de John Brown profunde impresis. Al ili precipe, al

ilia raso tra la tempo estas adresitaj liaj fervoraj admonoj, al ĉiuj sklavoĵoj ia- aŭ aliaspecaj kiuj estas ni. Kiam li puŝas, hontigas ilin pro ilia malkuraĝo, ilin instruas pri la fiereco kaj danĝero esti homoj, ne plu temas pri Mass, Nebraska, la negra demando de la 1850aj jaroj, nek pri la kadro de negra vilaĝo en Novanglio : temas same pri ni, niaj problemoj, nia horizonto, nia ribelo, nia malkuraĝo kaj nia fido hodiaŭaj. Ni ne petas klarigojn. Ni senpene komprenas.

Kun sia vipanta akreco, sia vervo, sia severa logiko, tia idealista fido, kiu ne mezuras la obstaklojn, ilin preterpasas kaj flugas rekte al la celo, - kiajn oportunajn lecionojn li ankoraŭ nun ŝajnas doni al ni. Kiel ni tiom pli volonte ilin akceptas, venantaj de artisto, kiu tiel bone regas siajn kapablojn, eĉ la kapablon nin emocii ! Tion legante, ni rekonas - pri la militarismo, pri la gazetaro, pri la Patrio, pri la Ŝtato kaj individuo, pri la stulteco de la bariloj arbitre fiksitaĵoj inter la homoj aŭ homgrupoj, - tiajn eldirojn, kiuj nenie estis esprimitaj en formo pli definitiva, kun la tono de tiuj ĉi, ekzemple :

"Ni parolas pri reprezenta registaro; sed kiel monstra estas tiu registaro, en kiu la plej noblaj spiritaj kapabloj, la koro en sia totaleco ne estas reprezentitaj ?"

"...koncerne la brutaron el gazetoj kaj periodaĵoj, ne okazis, ke mi ekkonis en la lando direktoron, kiu akceptas ion publikigi, se li scias, konklude al funda pripensoj, ke ververe tio malpligrigos la nombron de liaj abonantoj... Se ni ne diros plaĉajn aferojn, rezonas ili, neniu sekvos nin. Tial, ili faras samkiel certaj foirvendistoj, kiuj kantas malĉastajn kantojn por altiri ĉirkaŭ si la homamasojn."

"...kiam en ia senfama vilaĝo la kamparanoj arigas en eksterordinara komunumkonsilantaro por esprimi sian opinion pri ia temo alarmanta la tieajn loĝantojn, mi opinias, ke tie ja estas la vera Parlamento kaj la plej respektinda, kiu iam ajn kuniĝis".

"... Ni revas pri fremdaj landoj, aliaj tempoj, aliaj homrasoj, imagante ilin foraj en la historio aŭ la spaco; sed se estiĝas en nia medio signifoplena evento, ni ofte malkovras inter ni kaj niaj plej apudaj najbaroj tiun distancon, tiun fremdan karakteron. "Ili" estas niaj Aŭstrio, Ĉinio, kaj niaj insuloj en la Suda Maro. Subite en nia societo, kie ni kunpremiĝis, fosiĝas grandaj intervaloj, nia societo aperas neta kaj bela antaŭ niaj okuloj - civito kun grandiozaj perspektivoj. Ni malkovras kial ni antaŭe neniam iris kun niaj najbaroj trans la komplimentojn kaj la supraĵojn, ni ekrimarkas, ke estas tiom da verstoĵoj inter ni kaj ili, kiom inter Tataro kaj Ĉina urbo. La pensanta homo fariĝas kvazaŭ ermito en la svaro de la bazarplaco. Netransireblaj maroj subite atingas sian nivelon inter ni, aŭ mutaj stepoj etendiĝas foren. Ne la riveroj kaj la montaroj formas inter la individuoj kaj inter la Ŝtatoj la verajn kaj netransireblajn barilojn, sed la malsameco de konstitucio, de inteligento, de fido. Solaj povas, kiel plenrajtigiloj, viziti nian kortegon, la spiritoj al ni similaj."

"Neniam la leĝo liberigos la homojn; havas la homoj devon liberigi la leĝojn."

"...Mi rememorigus al miaj samlandanoj, ke ili unue estu homoj, kaj Amerikanoj nur pli malfrue, kiam ili havos tempon."

°°

Temperamente fierega kaj soleca, Henry Thoreau havis tian trankvilan decidemon, kiu ĵetas "ne" en la vizaĝon de iu ajn moŝto, ne mezurante la konsekvencojn, - ne tia aŭdaĉo, kiu predikas impostrifuzon fronte al krimeca registaro, sed kiu persone rifuzas la imposton kaj iras en karceron - tian abruptan noblecon, kiu, spite ĉian singardon kaj sen rigardi, ĉu ĝi estas sekvata, sin ekĵetas helpe al la falinta amiko, kiu pravas kontraŭ la tuta mondo.

Akorau pli ol de la registaroj kaj de la institucioj, li estas Malamiko de la Popolo el timulaĉoj, de la brutaro el malsovaĝigitaj bestoj. Liaj sarkasmoj estas amaraj. Li parolas nome de la homo simpla, mirinde klara, riĉ- kaj liberanima, la **ESTAJO NE DRESEBLA**, kiu estas por li la plej alta ekzistopravo de la specio. Li parolas nome de la mirinda vivo, eterne freŝa kaj spontana, kontraŭ la eternaj rutinoj, kiuj enpolvigas kaj haladzigas nian ekzistadon. Li venas el la arbaroj kaj rivero kun bonaj kaj grandaj novaĵoj por ĉiuj. Li estas unika kompano, diskreta, impete elokventa, plena de retenata pasio, samtempe simplanima kaj informita, kaj precipe nobla, de nobleco, kiu povus sen malriĉiĝi prunti al la tuta specio. La sola kunestado, kiu plene kontentigas lin, homo de alta intelekta kulturo, estas tiu de la plej komunaj el la homoj, la plej simplaj - la malplej difektitaj, la plej proksimaj de la gustoplena realeco - la kreitaĵo tute pura kun ĝia natura aromo, ĝia sincera vizaĝo ne malheligitata de la malbelaj zorgoj, kiuj obsedas la respektindajn burĝojn kaj la gravajn farmistojn de Concord kaj aliaj lokoj.

En ĉia fazo de la mondhistorio, kiam la homaro kvaŝaŭ brutaro troigos sian rajton pri malnobleco - ekzemple kiam ĝi senreziste cedas al la devigo de kolektiva murdo, ne ŝajnante pri tio senti la hororon - la bonkvalitaj animoj, rifuzante saluti ĝian regnon kaj rekonigi siajn samulojn sub tiaj falsaj vizaĝoj, sin turnos kun amo al Henry Thoreau; ili trovas en li la plej akran kaj plej fratecan esprimon de siaj abomeno, humiligo, ribelo, ofendita idealo - esprimon kneditan kun braveco, fiereco, alta kaj serena fido, al ili bonfara kaj savanta.

La tuta vivo de Thoreau, lia mallonga vivo kunpremita inter ĉi tiuj du datoj 1817 - 1862 kaj en distrikto de Novanglio, estas liberecana depostulo, alvoko al la natura nobleco de l'homo tra unu el la plej puraj, plej sukoriĉaj ekzistadoj iam elvivitaj. Ŝajnas, ke ĝi estis malmulte komprenita - eĉ de tiuj, kiuj plej kore omaĝis la verkiston, la artiston, la fidindan kaj agreble delikatan amikon. (...)

La ermito de Walden estas nek filantropo, nek mizan-

tropo. Li nur havis tiel fieran, tiel vivantan koncepton pri la homo - la homo liberiĝinta de siaj malnovaj malvirtoj : monaferoj, antaŭjuĝoj, rutino, malkuraĝo, bondiaĵaĉoj, politikajaĉoj - ke la "civilizita" mondo ĝenerale, la hodiaŭa sociordo, aperis al li kiel trompado jen krimeca, jen burleska, kaj ke li turnis al ĝi la dorson. Tio ĉi estis lia rajto, kaj estas ankoraŭ pruvote, ke li tute malpravavis, vidante ĝin tia. Por nomi lin sia frato, li postulis de sia proksimulo, ke li posedu certajn esencajn kvalitojn; se ne, tiu ĉi ne plu estis homo antaŭ liaj okuloj, kaj li traboris per pikmokaĵoj - ne sen sekreta espero vekti la memestimon de la dormanto - tiun fiaskulon, tiun karikaturon, tiun atencon kontraŭ la homeco. Poste li montris kion nomis li "la sovaĝeco", li montris la promeson de pli bona sociordo. Laŭ li, Ruĝhaŭtulo estis ja malpli fore de la civilizacio ol ia ajn sinjoro kontraŭ li sidanta en la kupeo, pripensante sian vendotan varon; arbohakisto, rivera ŝipano, plugilservisto estis por li multe pli noblaj specimenoj de homeco ol senatano, aŭ episkopo, aŭ princo de la butikistoj. Kaj senpene lia vivo nature restis en harmonio kun tia starpunkto. Li praktikis civilizacion sian, lasante la mondon al ties diversaj frenezaĵoj. Rigardi lin malamiko de la homaro, tio estas naivaĵo ripetita kaj sendube longatempe ripetota de tiuj maljunaj lernejanaj, kiuj ankoraŭ ne scias legi inter la linioj. Se la tiel nomata genro hcma havus multe da tiaj malamikoj, ĝi baldaŭ sin rivelus pli inda je sia epiteto.

Léon BAZALGETTE

Elfrancigis D.C.